# LEGI

*La « Espéranto-Gironde » Informilo*

OKTOBRO 2012

N° 132

## Ĝ-A- CENON




30/09/2012



**ESPERANTO GIRONDE**
**ĜENERALA KUNSIDO**
**30-an de septembro 2012**
**je la 10-a 45**
**en Cenon**

**__Ĉeestas__ :** Sabine Ardouin, Jean-Séb' Brillaud, Janine Dumoulin, Yannick Dumoulin, Monique Dussenty, Brigitte Favérial, Thierry Favérial, Gloria Gargallo, Danièle Guillaume, René Guillaume, Christiane Jagueneau, Michel Jagueneau, Bruno Ferré , Joël Lajus, Maria Marc, Claudine Pomirol, Marcel Redoulez, Rose Sarlandie.

**__Senkulpigitaj__ :** Jean-Claude Bot, Micheline Demontoux, Ges-roj Hérard (s-ro Hérard sendis rajtigilon al Joël), Louisette Levraud, Bernard Sarlandie.

## 1. Agadraporto (Joël)

### a/ __Agadoj de post la pasinta ĝenerala kunsido en Margueron__ :

- Zamenhof-tago : en Margueron, kune kun festo por la 80-a datreveno de Sabine.
- Akcepto de rumana esperantistino Rodica, kiu prelegis en Cenon pri Rumanio. Prezidantino de IFEF : do ŝi revenos en venonta majo okaze de la kongreso.
- Deĵorado en la Bordoza Foiro. Estis malgranda budo. Eble ne estas taŭga loko por propagandi por Esperanto.

Libourne : pasintan sabaton, budo en la asocia forumo. En Libourne estas nova domo por asocioj en eksa lernejo. Joël opinias, ke oni povus peti ĉambron por Esperanto, des pli ke Jean-Claude Bot baldaŭ transloĝiĝos el Galgon. Tamen ne multaj Liburnanoj sin montris interesataj. Estis la okazo paroli kun la urbestro kaj la deputito.

### **b/ Kursoj :**

• **En Cenon** : lunde ; 5 anoj, kiuj zorgas pri tradukado (nuntempe, de materialo por libreto de la IFEF-kongreso : legendo de Saint-Emilion).
• **En Galgon** : vendrede de la 18-a ĝis la 20-a ; inter 5 kaj 8 anoj. Pasintjare juna instruistino, kiu instruas en Cercoux, eklernis kaj daŭrigas entuziame la lernadon. Kaj ĉijare, nova juna virino, kiu partoprenis la piedan ralion antaŭ 3 jaroj, komencas lerni.
Ideo en la grupo : korespondi kun eksterlandaj esperantistoj. Do preparo de retmesaĝo por sendi al diversaj eŭskaj grupoj.
• **En Montendre** : marde de la 10-a ĝis la 12-a ; 6 anoj. Okazigis "malfermpordan" aranĝon sed neniu nova venis eĉ por viziti.
• **En Sainte-Foy** : duonripozas.
Marcel demandas, ĉu iu konas Esperantiston el Audenge pri kiu li aŭdis okaze de sindikata kunveno.

### **c/ LEGI**

Ĉijare aperis nur 3 numeroj (anstataŭ 6) pro manko da kontribuoj. Monique estas teknike helpata de Bruno.
Monique alvokas al kontribuoj, ekz. per prezento de la urbo, kie oni vivas, ktp. La artikoloj povas esti plej diverstemaj, pri diversaj spertoj...

## 2. Financa raporto (Monique)

37 kotizintoj al Espéranto-gironde (39 en 2011)
12 aligxintoj al SAT-Amikaro (13 en 2011)

Enspezoj (25/09/2011 ĝis 30/09/2012) … 1.893.41 €
Elspezoj ……………………………………. 1.795.25 €
Bilanco …………………………………….. 98.16 €
Ŝparkaso …………………………………… 4.217.64 €

Monique estigis specifan kolumnon por la kongreso. La elspezoj por la preparo de la kongreso estos repagitaj (ekz. vojaĝkostoj de Lino).

Marcel proponas, ke ni pripensu la jenan demandon : Ĉu valoras, ke ni lasu parton de la ŝpara mono sur konto de etika banko (NEF°, kiel faras SAT-Amikaro) ?
Monique informiĝu pri tiu ebleco por la venonta ĝenerala kunsido. Ŝi povos demandi de Guy Martin, kiel okazis la transiĝo por SAT-Amikaro.
Ni voĉdonu en la venonta ĝenerala kunsido.
Joël : En 2007, ni tradukis informfolion de NEF por la SAT-Amikara kongreso.

## 3. Partopreno en IFEF-UFE kongreso

Pluraj el ni jam partoprenis en pluraj preparaj kunvenoj.
La kongreso okazos de la 4-a ĝis la 11-a de majo (Ĉieliro : la 8-an).
Estas atendataj 280 partoprenantoj.
Marcel respondecas pri la kultura programo.
Bernard zorgas pri rilatoj kun la ĵurnalaro.
Nia tasko estas helpi kaj prepari ekskursojn.
Marcel klarigas, ke la prezidantino de AFCE (franca asocio de esperantistaj fervojistoj) decidis, ke la 2013-a IFEF-kongreso okazos en Artigues. UFE kaptis la okazon por kongresi unuafoje en Ĝirondio. UFE ĉijare kongresos ekde la merkredo.
Ili petis, ke ni helpu pri la surlokaj kontaktoj por la ekskursoj.
Ni mem engaĝiĝis por proponi kulturan programon.
Ili do atendas, ke ni organizu la ekskursojn kaj la kulturan programon.
Ni gvidos la grupojn sed NE NI organizos la ekskursojn, zorgos pri la biletoj, kontrolos la partoprenantojn ktp.
Estos pli malpli 200 internaciaj esperantistoj (en 2012, ili estis el 17 nacioj) do ni nepre devas NE MALTRAFI tiun rendevuon. Estos bona okazo por praktiki Esperanton.

**Ekskursoj :**

Tuttagaj :

Mardon la 7-an : • Markvezo : Marcel, Claudine, Ge-Lafosse
• Arkaŝono : mankas animantoj

Sabaton la 11-an : • Surŝipe laŭ Garono : Claudine, Marcel
• Arkaŝono : mankas animantoj

Duontagaj (posttagmeze):

Lundon la 6-an : • Bordozo piede : Bernard, Rose, Yannick, Janine
• Bordozo perbuse : mankas animantoj
• Saint-Emilion : Joël

Vendredon la 10-an : • Blaye : Gloria, Yannick, Janine
• Bordozo perbuse : Rose, Bernard
• Bordozo piede : Marcel
• Ĉe Gerard la meblisto : Joël

Alia ekskurso estas antaŭvidita : Tramriparejo, pri kiu zorgos Michel Lafosse





Unu el la organizantoj zorgas pri la bildo de la kongreslibro : Pont de pierre + datoj kaj logotipo de la diversaj asocioj.
Aperas sur la libreto iu logotipo de Esperanto Gironde, ne la "oficiala" ĝis nun uzita : Joël bedaŭras, ke tio ne estis decidita de la tuta anaro. Marcel klarigas, ke li disponis nur de tiu. Eble ni povos remeti la "oficialan" sur la libreton.
Ĉu nova logotipo necesas ? Pripensinda afero por la venonta Ĝenerala kunsido.

## 4. Raporto pri Hanojo

Janine proponas, ke ĝi estu prezentita post la kongreso (kun bildoj ktp.).

## 5. Perigorda informilo

En lasta numero de tiu informilo, temas pri la centjariĝo de René Treny, kiu estis instruisto en Le Fleix, Dordogne. Li estigis esperantan grupon en 1982 kun Henri Normand (tiu lasta vizitis Joël en Marcenais). La grupo multe aktivis en la jaroj 1985-87-aj.
Alia dordonja esperantisto, Raël Sainte-Croix festos sian 100-an datrevenon en oktobro. Joël bone konas lin. Li proponas ke la grupo sendu gratulajn kartojn al ili.
La gazeto raportas pri la Hanoja kongreso.
Ĝi estas verkita ĉefe en la franca.

## 6. Propono de Guy Cami

Guy Cami, esperantisto el Oloron, proponas veni por prelegi pri Esperanto en Ĝirondion. Ni zorgu pri loko.

## 7. Kalendaroj JEFO

Senpage senditaj, sed atendas kompensmonon. La grupo sendos 20€.

## 8. <u>Diversaĵoj</u>

• Jara kotizo : ne ŝanĝiĝis de 2007.
Ni decidas, ke ĝi restu sama :individua : 17€
para : 23€

Monique informas, ke se oni aliĝas al SAT-Amikaro pere de Esperanto-Gironde, la grupo konservas parton de la pago.

## •**Baloto por nova prezidanto**.

Rose legas mesaĝon de Bernard, en kiu li deklaras sin kandidato. Li mencias la proponon de Maurice Jouy restarigi la Akvitanian kunagadon.
Joël dankas kaj Bernard, kiu konsentas anstataŭi lin kiel prezidanto, kaj Monique, kiu daŭrigas esti nia kasistino. Dankon ankaŭ al la duopo Monique-Bruno kiu preparas kaj sendas nian gazeton "LEGI".
Gloria bonvolas helpi de tempo al tempo por sekretariaj taskoj.

## **Venontaj kunvenoj** :

- ***11-a de novembro*** je la 10-a en Cenon (preparado de la kongreso)

- ***2a de decembro*** je la 10a- en Cenon (**Zamenhof-tago** : interalie provprezento de la bildoprelego pri maskaronoj far Marcel - daŭro : 45 mn).

***La kunsido estas fermita je la 13-a.***

***Janine***



# Hanojo , 28/7-4/8/12 : nia dua UK.

Ĉar ni ne konis Azion, ni decidis, Rose, Estelle kaj mi, partopreni en la Universala Kongreso en Vjetnamio, kaj ankaŭ iri kun la karavano de Esperanto France, kiu permesis al ni viziti la sudan parton de la lando : Saigonon kaj la delton de la Mekongo, la imperian urbon Hue en la centra parto, kaj Hanojon en la nordo, sen forgesi la memorindan tagon kaj nokton meze de la Halong golfeto. Nia vojaĝo finiĝis per du plenplenaj tagoj en la kambodĝa urbo Siem Reap, apud Angkor.

Post nia unua kongreso en Kubo, ni estis alkutimiĝintaj al la funkciado de internacia renkontiĝo, kaj certe, ni partoprenis en plimultaj diversaj okazaĵoj.

Unue, kompreneble, ni ĉeestis la *movada foiro.* Tie, ni ricevis dokumentojn pri la kongreso de 2014 en Bona Aero. Tre verŝajne ni vojaĝos al sud Ameriko.

Sekvontan tagon okazis la solena inaŭguro en la universitato de Scienco kaj teknologio. Ruĝa tapiŝo bonvenigis nin. La klarigo estis, ke partoprenis la vic-prezidantinoj de la Respubliko kaj de la hanoja urba konsilantaro. Pluraj ambasadoj estis reprezentitaj, sed neniu el Francio : grava honto por ni ! Ni ne partoprenis en la posttagmezaj okazaĵoj, ĉar nis estis vizitantaj Hanojon. Male ol en Kubo, ni ne havis esperanto-parolantan gvidiston ; li provis paroli la anglan, kaj ni diris al li : « Parolu la vjetnaman kun Gxojo, la helpantino, kaj ŝi tradukos.» Estis la sama dum la tuttagaj ekskursoj. Revenante, ni ĝuis la nacian vesperon, miridan spek-

Ankaŭ lundon matene ni ekskursis. Kaj poste, kiam Rose kaj Estelle iris al kurso, mi spektis paradon de belegaj vjetnamaj roboj ilustrantaj la modon tra la jarcentoj. Tuj poste, mi, por la unua fojo, partoprenis en diskuto pri la kongresa temo : ***Esperanto – ponto al paco, amikeco kaj disvolviĝo,*** kie mi renkontis k-don Osioka el Japanio, kiu venos en Artigues venontan majon.

.	Finfine mi aùskultis Stefan McGILL, kiu, kadre de la Internacia Kongresa Universitato, prezentis al ni prelegon pri *Vortŝercado en Esperanto.* Lundon vespere estis la tago de bankedo kaj balo : ni ĝuis la unuan sed, ĉar la muziko estis laùtega, ni rapide forlasis la duan.

Post nia marda matena ekskurso, kune kun du aliaj grupanoj de la karavano mi ĉeestis  la renkonton pri ĝemelaj urboj : ni estis pli multnombrajl ol en Kubo kaj diversaj proponoj estis prezentitaj. Mi enskribiĝgis ĉe la grupo, kiu devus plu pripensi pri tiu afero. Ni tagmanĝis kune kun Rose kaj Estelle, kaj mi iris al la kunveno, kie S.A.T. estis prezentita de Franciska TOUBALE : pluraj dekoj da partoprenantoj. Dum la vespero, revenante el la spektaklo, la busŝoforo rifuzis ekiri, ĉar vojaĝontoj estis starantaj ; do iu faris anonceton : « La starantaj pasaĝeroj, bonvolu eliri el la buso kaj preni la sekvontan. » Nenio reago. Sekvis alia anonceto : « Ladies and gentlemen, those standing, would you please get off the bus and take the following one.” Subite, ĉiuj koncernataj eliris !

Merkredo : kongreso fermata : ni vojaĝis montaren por viziti Mai Chau tribon.

Notindaj dum Jaùdo : matene ni spertis vjetnaman masaĝon, ĉu en la hotelo, ĉu en instituto. Posttagmeze : filmo pri Tibor SEKELJ, kaj ege amuza teatraĵo vespere : *Kompleta historio de Universalaj Kongresoj.*

Vendredo estis dediĉita al la kunveno de ateistoj, la internacia koruso, kaj la internacia vespero. Kaj dum tago ni ankaù vizitis la muzeon pri virinoj, ĵus apud la kongresejo : ege interesa.

..................


Restis nur sabate la solena fermo de la kongreso (sen ruĝa tapiŝo) : ni estis jam pretaj por flugi al Siem Reap, apud Angkor, en Kambodĝo.

Vi povas vidi fotojn kaj pli detalajn (sed franclingve) artikoletojn ĉe la reta tag-ĵurnaleto sub la adreso : [bernard.sarlandie.over-blog.fr](bernard.sarlandie.over-blog.fr)

***Nome de la Sarlandia familio : Bernardo***







**Mi ĵus legis…**

…*Ŝia lasta poŝtkarto*-n, krimromanon verkitan de Serĝo ELGO, pseŭdonimo de Georges LAGRANGE, en 1988.

Tiu romano okazas en ne-difinita lando, certe eùropa. La riĉa familio HANĈO travivos dramon ene. Tra la enketo kondukita de inspektoro KRAMER kaj de liaj kolegoj, oni malkovras, ke la vivo de tiu familio ne estas tiel simpla ol ĝi ŝajnas. La verkisto kondukas nin al diversaj padoj, kie ni renkontas tre diversajn personojn, ĝis la malkovro de la farinto de la krimo, kiu memkonfesas.

Tamen, la historio ne estas finita, kaj post kelkaj paĝoj pli, granda surprizo atendas nin. Kompreneble, ne esperu, ke mi indikus al vi la finon de tiu romano…

Do tuj legu ĝin : mi pensas, ke ene vi legos la pli perfektan esperantan lingvon, kun multe da ege plezurigaj lingvaj trovaĵoj.

Bonan legadon.

***Bernardo***

# Pri neordianara SAT-Kongreso en Jalto (Ukrainio) raportas Marcelo kaj Klodin'.



De la 1a ĝis la 18a de aŭgusto SAT kongresis en Jalto sur la Ukrainia bordo de la Nigra Maro. (Sensurprize ĝi nigras nur dumnokte kiel ĉiuj ceteraj maroj !). Tiu kongreso prezentis plurajn originalaĵojn : unuafoje laŭ mia scio SAT kongresis en Ukrainio. Bedaŭrinde nur sesdeko da esperantistoj ĉeestis. Alia specifaĵo : la kongresprogramon la alvenintoj ne ricevis. Tial, ke tiu ĉi variis ĉiutage, foje eĉ plurfoje ŝanĝiĝis dum la tago, tute ne eblis antaŭ ol endormiĝi firme scii, kio okazus la morgaŭon. Okazis, ke posttagmeza tagordo ne disvolviĝis laŭ la sammatena anonco. Aŭ kvankam mardon vespere estis anoncite, ke merkredon enskribiĝintoj tuttage ekskursos al Sebastopolo, fakte pro manko de buso, ili prokrastis al ĵaŭdo…

Nekutima organizado !
Ni rapide konsciis, ke el du gravaj kialoj fontas tiu situacio : unue grava urba evento « la miljara jubileo de la urbo » kaj due la personeco mem de Jefim Zajdman, kiu invitis la kongreson en Jalto. La festaj oficialaĵoj estis planitaj dum alia periodo sed la aŭtoritatoj lastminute ŝanĝis la daton. Tial samtempe kiel ni, tien alvenis ankaŭ pluraj miloj da turistoj kaj centoj da policistoj. Litojn en nia tranoktejo rekviziis instancoj por policistoj venintaj el diversaj ukrainaj urboj por helpi siajn jaltajn kolegojn. Jen alia unikeco : neniam SAT-kongreso estis tiel bone sekurigita ! Eble ne plu ofta sed tre agrabla estis ankaŭ la granda proporcio de gejunuloj aktive partoprenantaj ne nur en la kulturaj kaj eksterprogramaj eroj sed ankaŭ en la laborkunsidoj, prelegoj kaj debatoj.

Jefim gvidis nin tra la urbo, historie riĉa, ne nur pro la Konferenco en 1945 sed ankaŭ rilate la E-movadon. Vizitinte la muzeon Anton Ĉeĥov, ni spektis teatraĵetojn de tiu klasika rusa aŭtoro, kiu tie vivis suferante pro tuberkulozo. Ne ĉiuj aktoroj estis veraj esperantistoj
.

Inter ili, dekjara kanabeto papage deklamis sian viglan rolon tiel perfekte, ke li akiris grandan simpation de la publiko. Post la spektaklo mi provis rilati kun li, simple por instigi lin al profunda pristudo de nia interancia lingvo samtempe kiel de la teatrarto, memorante pri propra persona evoluo.

La ekskursoj ĉirkaŭ Jalto, al la diversaj palacoj Livadia, Alupka, Masandra, kaj la aparte fama Hirundonesto, montris tre belajn konstruaĵojn kaj admirindajn pejzaĝojn. Plej admirindas la panoramo de sur la monto Ai-Petri, kiu rigardas de pli ol 1.200 metroj super la urbon kaj de kie telfero en kelkaj minutoj kondukas vin rekte al maro : impresega sensacio garantiata ! Ni provis… kaj ĝuis !

SAT-Kongreso ne estus E-kongreso, se ne videblus kiel ĉiam retrovo de malnovaj gekamaradoj, malkovro de novaj, sinceraj, senperaj kontaktoj, kiuj naskas varmajn emociojn, teksas fortajn homajn ligojn. Tiajn ankaŭ ni reportis el Ukrainio. Tial ni dankas al Jefim, Anĵela kaj iliaj kunhelpant(in)oj. Ni restu en kontakto ankaŭ kun Andreo(j), Svetlana(j), Nikolao, Eŭgenja, Vanjo, k.a…



*Antaŭ la kongreso, junaj lernantinoj aŭdas improvizitan E.kurson sur la ekstera ŝtupa-*



*Perpieda ekskurso kun Ukrajnaj kongresintoj kondukis nin al la palaco Masandra.*

# KELKAJ LIBURNAJ NOVAĴOJ

I – La asocia forumo en Liburno.

Ĉi-jare, la galgona E-grupo decidis partopreni en la septembra asocia forumo en Liburno. Kial ?

Unue ĉar nia amiko Jean-Claude, prezidanto de la asocio Esperanto-Galgon, intencas baldaŭ transloĝiĝi.

Due ĉar en Liburno, de nelonge, staras tute nova domo por la asocioj. Kaj ni opinias ke, en tiu kultura kaj alloga loko, Esperanto devas ĉeesti .

Do, en baldaŭa estonteco, se ni sukcesos ricevi ĉambreton, ni proponos E-kursojn kaj nia loka grupo kunvenos tie .

Okaze de la forumo, Gérard kaj Joël deĵoris matene ; Jean-Claude kaj Sandra deĵoris posttagmeze. Ni sufiĉe efike varbis ; ni registris kelkajn adresojn de liburnanoj kiuj interesiĝis pri Esperanto kaj pri eventuala kurso en la urbo . Ĉu, du monatoj poste, ili ankoraŭ deziros eklerni ?...... Ni vidos !!

Tamen, tiu domo por la asocioj estas por ni taŭga loko por propagandi por la internacia lingvo !

II – Pri la galgona E.kurso .

Ok personoj regule ĉeestas la kurson en Galgono, vendrede de la 18a ĝis la 20a.

Pasintjare, ni havis junan komencantinon kiu nomiĝas Sandra. Ŝi estas instruistino kaj ĉi-jare, ŝi entuziasme daŭrigas la lernadon. Pasintan septembron, ni akceptis Hélène. Ŝi partoprenis, antaŭ tri jaroj, en nia pieda ralio kaj nun eklernas. Ni semas kaj semas !..

La galgona grupo ricevis jesan respondon de la E.asocio de Bilbao por korespondi. Ni baldaŭ sendos, per interreto, nian unuan informo-mesaĝon. Kaj, venontjare, eble ni veturos al Eŭskadio !

***Joël***

## UNUA AVENTURO DE RENARDO

Kiel Renardo nokte forprenis la ŝinkojn de Izengreno

Iun matenon, Renardo eniris ĉe sia onklo, kun malklaraj okuloj kaj hirta felo.

--`Kio okazas, kara nevo? Ci ŝajnas malbonfarta, diras la dommastro. Ĉu ci malsanus?
-- Jes, mi ne sentas min bonstata.
-- Ĉu ci ne matenmanĝis?
-- Ne, kaj mi eĉ ne deziras.
-- Nu ! Ek, Damo Hersent, tuj leviĝu, preparu por tiu kara nevo rostostangeton de renaĵo kaj lienaĵo. Li ne rifuzos ĝin."

Hersent ellitiĝas kaj pretiĝas por obei. Sed Renardo plibonaĵon atendis de sia onklo; li vidis tri dikajn ŝinkojn pendantajn de trabo supre de la ĉambro, kaj ĝuste ilia aromo allogis lin.

-- Jen endanĝerigitaj ŝinkoj, li diris. ĉu vi scias, kara onklo, ke se iu el viaj najbaroj (iu ajn, ili ĉiuj samvaloraĉas) ekvidas ilin, li postulos sian parton. En via situacio, mi senprokraste malpendigus ilin, kaj mi laŭte dirus, ke oni forŝtelis ilin de mi.

-- Ba! diris Izengreno, pri tio mi fajfas; kaj kiu povas vidi ilin, tiu neniam ĝuos ilian guston.

-- Kial do! Se oni petas iom da de vi?

-- Ne indus peti; da ili mi donos nek al mia nevo, nek al mia frato, nek al iu ajn en la mondo."

Renardo ne insistis, li elmanĝis la renaĵon kaj adiaŭis. Sed la postmorgaŭon li noktomeze revenis antaŭ la domon de Izengreno. Ene, ĉiuj dormis. Li grimpas sur la firston, truas kaj taŭgaranĝas aperturon, trapasas, atingas la ŝinkojn, forportas ilin, revenas hejmen, dispecigas ilin kaj kaŝas ilin en la pajlo de sia lito.

Sed jam , tagiĝas: Izengreno malfermas la okulojn. Kio? la tegmento, truita, la ŝinkoj, liaj karaj ŝinkoj, forprenitaj!

-- Help'! Ŝtel'! Hersent! Hersent! Perditaj ni estas.

Hersent abrupte vekita ellitiĝas, hartaŭzita.

—Kio okazas? Ho, kia misaventuro! Ni, senposedigitaj de ŝtelistoj! Al kiu plendi!

Ili konkure krias sed ne scias kiun kulpigi; ili vane klopodas por diveni la farinton de tia atenco.

*Sekvota ...*

**ESTRARO**
**de**
**« ESPÉRANTO-GIRONDE »**

* * * * * * * * *

Centre Culturel  Château Palmer
33150 CENON

Banque Postale : 347771 F Bordeaux

******************

Prezidanto : Bernard SARLANDIE
24 rue des Bosquets de Venteille
33185 LE HAILLAN
Tél : 06 83  29 40 13
Mail : bernard.sarlandie@gmail.com

Sekretario : (vaka posteno)

Kasistino :

Monique DUSSENTY
76 avenue La Fontaine
33560 CARBON BLANC
Tel : 05 56 06 74 49
Mail : monique.duss@free.fr